

Heinrich Heine,  
En la mirida bela Maj’

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj’,  
dum sin burĝonoj fendis,  
en mia kor’ la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj’,  
dum birda tril’ ne ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)*

Heinrich Heine,  
En dolĉega Maj’

*tradukita de Friedrich Pillath*

Printempe en dolĉega Maj’,  
Dum la burĝonoj krevis,  
El mia koro ĝerme  
Amsento sin eklevis.

Printempe en dolĉega Maj’,  
Dum birda kanto sonis,  
De l’ kora mi sopiro  
Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

*Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)*

*Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich\\_Pillath](http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath).*

Heinrich Heine,  
En Majo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

En Majo, kiam ĉiuj  
Burĝonoj malfermiĝis,  
La amo kiel floro  
En mia kor’ estiĝis.

En Majo, kiam ĉiuj  
Birdetoj sin aŭdigis,  
Al ŝi deziron mian  
Sopiran mi sciigis.

*Traduko de la Germana poemo “Im Mai” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982-11-14.*

*MR-002-4 / Arg-203-403 (2004-04-05 20:37:00)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I.*